

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.
Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protaktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburĝ
Ernest Archdeacon, Paris
I. Gilli Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 208
7. 9. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,20 sv. fl. por landoj, kies valuto
sufiĉe maksimume 50%; por ĉiuj aliaj
landoj 0,08 dol. aŭ 0,25 sv. fl.

Anonprezo

po kvadrata-centimetro egalvaloro de
0,20 sv. fl. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fl.),
en „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburĝ, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

175. Datreveno de la naskiĝtago de Goethe.

Unu semajnon antaŭ eliro de tiu ĉi numero ne sole en lia naskiĝurbo Frankfurt a. M., sed en tuta Germanujo kaj eĉ en eksterlando oni solene festis la 175. datrevenon de la naskiĝtago de Goethe, la plej eminenta germana poeto.

La verkado de Goethe kaj Schiller signas la kulminacian punkton de l' klasika epoko de la germana literaturo.

Goethe nomis siajn verkojn „Frakcioj de granda konfeso“. Kaj fakte en li vivo kaj kreado estas en plej intimaj rilatoj. Li havis la kutimon fiksi ĉiujn travivaĵojn, ĉu ĝojgajn, ĉu malĝojgajn, en poeta formo kaj per tio li limigas la percepton de ĉiuj spiritaĵoj sperto, kiujn havigis al li la vivo.

La signifo de liaj verkoj por la germana literaturo kaj la fakto, ke oni nomas lin en la ne granda vico de plej eminentaj homoj de la kulturmondo devigas nin, interesiĝi pri li.

Johann Wolfgang Goethe naskiĝis la 28. aŭgusto 1749 en Frankfurt a. M. kiel filo de la imperiestra konsilisto Johann Kaspar Goethe. Lia patrino Katharina Elisabeth estis la filino de la urba burĝestro Textor. Lia patrino multe influis la spiritostaton de l' junulo, kion Goethe mem karakterizis en famekonata verso. La bonkoreco kaj la animgajeco de la ĉiom afabla „Sinjorino konsilisto“ respektas sin dum la tuta vivo en la karaktero de Goethe.

Li estis edukata en Frankfurt. La patro mem instruis lin kune kun lia 7-jara malpli juna fratino Kornelia. La granda komercurbo Frankfurt kun ĝiaj patriciaj domoj, la komercigo de l' „sejara milito“, la studo de la siatempa poezio, la elekto kaj kronado de la imperiestro Josefo II, la konatiĝo al artamanto franca kaj la franca teatro, ĉio-ĉi postlasis grandajn impresojn en li.

En 1765 Goethe iris al la universitato de Leipzig por studi jursciencojn. Sed nek tiu scienco nek la prelegoj pri aliaj sciencoj allogis lin speciale. Li partoprenis en la filmova societa vivo de tiama Leipzig, konatiĝis al la direktoro de la akademio por desegno-arto Oeser, kiu akcelis liajn artistajn provojn kaj fine enamiĝis en filino de gastejestro kun nomo Käthchen Schönkopf.

La amikeco baldaŭ estis rompata de la knabino. Goethe sekve de ne ĝusta vivmaniero malnaskiĝis, tio devigis lin returni al la gepatra domo. Amikino al lia patrino Susanne von Kleitengberg flegis lin kaj influis lin multe. En „Wilhelm Meister“ li memorigas pri ĝiaj bonaj agoj.

En 1770 li rekomencis la studojn en Strassburg, sed interesiĝite de sia amikaro, konsistanta plejparte el medicin-studentoj, li okupis sin ankaŭ multe pri medicino kaj naturscienco. Tie li ankaŭ konatiĝis kun Herder, kiu interesiĝis lin pri naturaj originalaj poetoj: Homer, Ossian, Shakespeare ktp. La influo de Herder estas ankoraŭ poste sentebla en verkoj de Goethe. En Strassburg okazis alia am-epizodo de Goethe. Li enamiĝis en Frederike Brion, la filino de l' pastro de Sesenheim. Li disigis poste la rilatojn, nevolante katenigi sian libereceman kaj evoluigeman naturon. Ankoraŭ longtempe li suferis tamen pro la disigo. Ni renkontas la memorigon en la dramo „Götter von Berlichingen“ kaj en „Clavigo“.

De 1771 ĝis 1772 li estis advokato en Frankfurt. En somero 1772 li iris al Wetzlar, kie li laboris ĉe la regna supera tribunalo. Li konatiĝis dum bato al Charlotte Buff, la filino de l' distriktestro de Wetzlar kaj fianĉino de la legacia sekretario Kestner. Sed li kontraŭstaris mem al enamiĝo. Goethe aludas al tio en „Suferoj de l' juna Werter“ (1774).

En 1775 li estis denove en Frankfurt. Tie li finis la dramon „Götter von Berlichingen“ (la vivpriskribo de l' frankonia kavalaro Götter von Berlichingen kun kombino de apartaj ideoj de Goethe)



Joh. Wolfgang v. Goethe

Ifigenio en Taŭrido.

Akto unua. — Sceno unua.
Ifigenio (sola).

Al via ombro, pintoj moviĝemaj
De l' densa kaj antikva arbareto,
Al la sanktaj kvietaj de l' diino
Ankoraŭ nun kun trema sent' mi iras,
Simile kiel la unuan fojon:
Ne povas mi al vi alkitimiĝi,
Ĝam multajn jarojn min ĉi tie kaŝas
Plej alta volo, kiun mi obeas:
Mi tamen ĉiam sentas min nur fremda.
Car ve! Transmare estas miaj karaĵ!
Mi longajn tagojn staras sur la bordo
Serĉante per la kor' la Grekan landon:
Al miaj ĝemoj nur per surdaj tonoj
Respondas la ondegoj de la maro.
Ho ve al tiu, kiu devas vivi,
For de l' gepatroj kaj de la gefratoj!
Malĝojo al l' rabas la feliĉan;
Forvagas flanken ĉiam liaj pensoj
Al la gepatra domo, kie sumo
Al li aperis la unuan fojon,
Kaj samdomanoj ĉiam pli kaj pli
En ludo alligiĝis reciproke.
La diojn mi ne juĝas: tamen vere
Plendinda estas stato de virino.
En domo kaj milil' la viro regas,
En fremda land' li ankaŭ al si helpas:
Li la posedon, li la venkon ĝuas,
Eĉ lia morto estas morto glora.
Sed la virinon ĉio ĉirkaŭbaras!
Eĉ krudan edzon obeadi estas
Por ŝi ne sole devo, sed konsolo;
Sed kiel mizerenda ŝi fariĝas.
Se en fremdlandon pelis ŝin la sorto!
Ĉi tie Toas, nobla viro, tenas
Min en kafenoj sanktaj, tamen sklavaj.
Kun honto mi konfesos, ke mi servas
Al vi, diino, mia savintino.
Nur kontraŭvole? Tamen mian vivon
Al vi dediĉi devus mi libere!
Al vi, Diana, ĉiam mi esperis,
Ankoraŭ nun esperas mi senĉese,
Vi min, filinon de plej granda reĝo,
En vian sanktan aman brakon prenis,
Por savi de la morto. Ho, diino,
Se tiun grandan viron, kiun vi
Turmentis, postulante la filinon,
Kaj li al vi oferis la plej karan, —
Se la Agamemnonon dismilan
Vi de la Trojaj muroj disbatitaj
Venigis glorie en patrujon lian,
Se vi al li konservis la edzinon,
Elektron kaj la filon, la trezorinojn:
Vi ankaŭ min redonu al la miaj
Kaj min, savinte de la morto, savu
De l' ĉi tiea vivo, dua morto!

una el la plej belaj verkaĵoj de lia juna pulsanta spirito. La dramo estas revolucia novspecaĵo en la germana literaturo.

Goethe ankoraŭ ĉiam memoris pri Charlotte Buff. Kiam li ekaŭdis pri memmortigo de l' sekretario de la brunsviga ambasadejo en Wetzlar pro senespera amo al la edzino de aliulo li kunfandis tiun okazintaĵon kun sia propra vivo. Li skribis la jam aluditan verkon „Suferoj de l' juna Werter“. Akcelis lian verkadon lia senespera simpatio al Maximiliane Laroche, kiu poste edziĝis kun la komercisto Brentano. Tiu instigis Goethe ne plu fari vizitojn al lia domo.

Per „Werter“ Goethe fariĝis fama verkisto. Lia verko estis tradukita en multajn kulturlingvojn. Antaŭ la milito ankaŭ en la organo de UEA aperis traduko en Esperanto de dume mortinta samideano P. Usinger, Darmstadt.

Ĝis fino de l' jaro 1775 antaŭ ol Goethe iris al Weimar, li verkis konstante. Naskiĝis drama satiro kontraŭ Wieland (konata verkisto germana 1733—1815) „Dioj, Herooj kaj Wieland“, kelkaj ŝere-dramoj, la komenco de pli grandaj verkoj kiel „Faŭsto“, „Clavigo“ kaj kelkaj versaĵoj kiel „Kanto de Mohameto“, „Prometeŭso“ ktp.

Per korespondado l' ligandis sian gekonataron. Li konatiĝis al Klopsch (1724—1805), faris vojaĝojn al la Rejno kaj al Svislando. Krome li konatiĝis al la kronduko Karlo Aŭgusto de Weimar. Li fianĉiĝis kun la 17-jara Elisabeth Schönnemann, la filino de frankfurta bankiero. La gefianĉeco tamen poste estis disigita. Goethe ne toleris la konservativismon de l' vivpercepto kaj la sociatajn devigojn de la familio, kiu apartenis al la siatempa mon-aristokratio. Kelkaj versaĵoj poste memorigas pri tiu amo.

En fino de 1775 Duko Karlo Aŭgusto invitas lin veni al Weimar. La patrino de l' duko la nur 36-jara vidvino Anna Amalia, nevino de „Frederiko la Granda“ siatempe ĉirkaŭumis elektita rondo de spiritaĵoj eminentuloj. La duko mem, sentema kaj amema naturo, estis tre edukita. Grandan rolon ĉe la kortego de l' muzoj de Weimar ludis la virinoj. Goethe konatiĝis al Charlotte von Stein, malfeliĉa edzino de l' kortega ĉevaljestro. La ĉasta karaktero de tiu virino kreis idealan vivkomunecon inter ŝi kaj Goethe. En „Ifigenio“ kaj en la princino de „Tasso“ ni trovas aludon al ŝi.

Goethe unue estis gasto de l' duko. Ambaŭ amikiĝis kaj travivis multajn aventurojn. Poste Goethe influis la dukon pri serioziĝo kaj maturigo.

En 1776 Goethe eniris en la servon de l' ŝtato Weimar, fariĝis sekreta legacia konsilisto kaj plej juna membro de l' sekreta konsilantaro. En sama jaro laŭ lia instigo Herder estis vokata al Weimar. En novembro 1777 li faris vojaĝon al la montaro Harz (poeziaĵo: Harz-vojaĝo en vintro). En 1779 li estis nomata direktoro de la komisiono por konstruado de militistraj kaj vojoj, poste fariĝis eksterordinara sekreta konsilisto, prezidanto de la ĉambro kaj per tio ministro. Li estris samtempe la administradon de ĉiuj financoj, la domojn kaj la arbar-administracion. En 1779 la duko kaj li vojaĝis al Svislando.

En 1782 Goethe fariĝis nobelo. Dum la restado en Weimar malgraŭ siaj multaj oficaj devoj Goethe verkis multon. Li komencis „Tasso“, „Wilhelmo Meister“ kaj en 1779 finigis en prozo „Ifigenio“.

Ĉirkaŭ 1780 Goethe komencis seriozan studon de natursciencoj kaj de la filozofio de Spinoza. Pri ili li skribis diversajn verkojn, inter kiuj la plej gravaj estas „Provo klarigi la metamorfozon de la plantoj“ (1790). Opinioj pri Optiko (1791 ĝis 1792) Scienco de la koloroj (1806 kaj 1810) Pri morfologio (1817—1824). El la verkoj oni rekonas influon de Spinoza, li estas ano de l' panteismo kaj antaŭiras al Darwin rilate la sciencojn pri la homa evoluo. En pli malfrua tempo Goethe spirite alproksimiĝis al Leibniz.

La ofica multokupateco tamen malhelpis al Goethe efikiĝi sian poetan kaj verkistan povon. Li estis malkontenta pri tio kaj preskaŭ fuĝis al Karlsbad por vidi alian medion. De tie li vojaĝis

al la lando de lia sopiro: Italujo. De Verono li venis al Padova kaj Venezia. Li vidis palacojn, preĝejojn, bildojn, skulptaĵojn, krome ŝipkonstruojn, teatrojn, popolmorojn kaj je la marbordo li eĉ studis bordplantojn kaj marbestojn. En Romo li loĝis ĉe germana pentristo Fischbein (de kiu devenas portreto de li). Tie li ankaŭ finis la verkadon de „Ifigenio“. Li daŭradis la vojaĝon al Napoli (Vesuvo, Pompejo) kaj Sicilio, kie li faris geologiajn kaj botanikajn studojn. Li reiris al Romo kaj dum 11 monatoj pentris, verkis kaj faris poeziaĵojn. Li finis „Egmont“ kaj la „Kultr-ejon de la sorĉistinoj“ el „Faŭsto“.

Kun nova kuraĝo, novaj animimpresoj, saturigita de vera arto li reiris al Weimar, kie li alvenis la 18 junio 1788 post preskaŭ dujara restado en Italujo. De 1788—1789 li verkis „Romaj elegioj“, komenciatj en Italujo kaj plejparte aludantaj al lia kunvivo kun Christiane Vulpins, al kiu li konatiĝis post reveno. Kun Christiane Vulpins li vivis en libera edzeco. En 1789 ŝi naskis al li filon, sed nur en 1806 li edziĝis kun ŝi laŭleĝe. Christiane, kiu estis floriarboristino, ne kapablis profunde partopreni en lia poeta vivo, sed ŝi tamen sciis forpreni de li la multajn zorgojn de la ĉiutaga vivo. Multaj versaĵoj, dediĉitaj al ŝi pruvas lian dankemecon. Mi nur citas „La vizito“, „La feliĉaj geedzoj“, „La Metamorfozo de la plantoj“ ktp.

S-ino von Stein koleris pro lia subita foriro al Italujo; nun eĉ finis la rilatoj kaj nur post kelkaj jaroj estas iome restarigitaj.

En 1789 Goethe finis la dramon „Torquato Tasso“, en 1790 aperis la „Faŭst-fragmento“, post ankoraŭfoja restado en Italujo la „Veneciaj epigramoj“. En 1791 li prenis sur sin la direktadon de la kortega teatro de Weimar, kiun li dum la daŭro de sekvantaj 26 jaroj progresigis senĉese.

Okazis la franca revolucio, ŝalutita de multaj ankaŭ en Germanujo. Goethe estis malamiko de la revolucio; li tamen verkis kelkajn revoluciajn poeziaĵojn. Ili ne estas perfektaj, ĉar mankis al Goethe la anima enprofundiĝo. En 1792 li partoprenis al la prusa milito kontraŭ Francujo en la sekvantaro de l' duko, 1795 al la sieĝo de Mainz. Ambaŭ travivaĵoj li priskribis en „Militiro en Francujo“ kaj „Sieĝo de Mainz“. Poste li nove prilaboris malaltgermanan eposon pri bestoj „Reinecke Fuchs“ (originale presita 1498 en Lübeck) aperinta en 1794.

De 1794—1805 datumas la amikeco de Goethe kun Schiller. Jam en 1779 li aŭdis lian nomon okaze de vizito al la duko de Virtembergo. En 1778 ili renkontis reciproke en Rudolstadt. Amikeco tamen ne ekestiĝis. La karakteroj estis tro diversaj. Goethn jam pasis la epokon de entuziasmo kaj pro tio ne plaĉis al li la liberecemaj verkaĵoj de la idealisto Schiller. Ili kunvenis ankoraŭ kelkfoje pro mire aferoj preparolaj koncerne nomigon de Schiller kiel profesoro on ĉe la universitato de Jena. Malbone impresis al la ne-revoluciema Goethe, ke Schiller pro sia revolucia verkaĵo „La Rabistoj“ (tradukita en Esperanto de Zamenhof) ricevis la rajton de franca civitano. Schiller poste evoluigis en la direkto al vivperceptoj de Goethe. En Majo 1794 Goethe kaj Schiller renkontiĝis denove en Jena en la „Societo por naturscienca esplorado“. Tiam nur naskiĝis vera amikeco inter ambaŭ poetoj: Sekvis amika korespondado. La laborspirito de Goethe estis refortigita. Li kunlaboris al la verkoj „Horen“ kaj „Almanako de l' Muzoj“ de Schiller, finis en 1796 la verkon „Lernjaroj de Vilhelmo Meister“, en 1799 la eposon „Hermano kaj Doroteo“ kaj kelkajn aliajn kiel „La sorĉista lernanto“, „La trezorfosanto“, „La fianĉino de Korinto“, „Dio kaj la bajadero“.

Dum la tempo de 1797—1805 Goethe verkis malpli intense, tamen ankoraŭ sufiĉe fruktodone. Krome okupis lin la konstruo de l' kastelo en Weimar kaj la alikonstruo de l' tiea teatro, natursciencaj studoj kaj interesoj pri la arscienco. 1789—1800 li kunlaboris en la scienca gazeto „La Propileo“.

En 1805 mortis Herder, en 1805 Schiller. Goethe restis sola. Sekvis maltrankvilaj tempoj de l' Napoleona reĝimo. Post la batalo de Jena oni maroderis la urbon de Weimar. La duklando post la paciĝo devis aliĝi al la „Rejn-Federacio“. En 1808 mortis lia patrino. En sama jaro Napoleono venis al Erfurt pro la „Kunveno de la Regnestroj“. Li donis aŭdiencion al Goethe, parolis kun li pri liaj verkoj kaj entuziasmiĝis lin denove. Li finis la unuan parton de „Faŭsto“, en 1808 aperis la nekompleta dramo „Pandora“, la kulminacia verko de l' klasika stilo. Ĝi esprimas la opinion, ke la protektado de l' belo, de la scienco kaj arto, samtempe estas religio kaj protektado de l' morala bono.

Kiel jama maljunulo li enamiĝis en 1807 en la 19 jaran Minna Herzlieb. Lia disiĝo de ŝi mortigis la pasion. Sekvo de lia travivaĵo estas vico da poeziaĵoj kaj romano „La elektro-parencoco“ (1809), kiu reprezentas verkaĵojn pri la digneco de la edzeco.

Postan tempon Goethe dediĉis al priskribo de sia vivo. En 1811 aperis „Poezio kaj Vero“. Sekvis la germana milito de liberigo. Goethe restis preskaŭ tute indiferenta al ĝi. Li komideris grava la riĉigon de l' germana spirita vivo per

akiritajoj de l' tiama progresema franca spirito. Entute li ja ĉiam estis universala spirito, ne sole atentanta la nacian spirito-direkton. Nur en 1814 li verkis kelkajn patriotajn verkaĵojn.

En 1813 Goethe vidis germanan tradukon de la kanto-kolekto de l' persa poeto Hafiso (14. jarcento), kiu konatiĝis lin kun la poezio de la Oriento. Li imitiis la karakteron en verko „Okcident-Orienta Divano“. En julio 1814 li subite entreprenis vojaĝon al la Majno kaj Rejno.

Li profunde simpatiis kun Marianne Willemer, la juna edzino de frankfurta bankisto. Li rezignis pri ŝi, sed restis en korespondaj rilatoj. En la nomita verko „Okcident-Orienta Divano“ ĝi aperas kiel Suleika. Krome li dediĉis al ŝi kelkajn poemojn. En 1821 aperis la unua eldono de „La jaroj de l' migrado de Vilhelmo Meister“. En 1825 la 74-jarulo ankoraŭfoje estis kapita de pasio kaj enamiĝis en la 19 jaran Ulrike von Levetzov, kun kiu li konatiĝis en Marienbad. La amo ne estis respondata. En „Trilogio de l' pasio“ (la tielnomata „Elegio de Marienbad“) li fiksas tiun ĉi okazintaĵon.

Pri la lasta jardeko de l' granda geniulo ni estas bone informitaj el la notoj de lia intima amiko kaj sekretario Eckermann (1792—1854). En 1816 mortis lia edzino Christiane. Post la morto lia filo Aŭgusto edziĝis kun Ottilie von Pogwisch. Goethe fariĝis avo al aliaj du infanoj Walther kaj Wolfgang. La edzeco de lia filo ne estis feliĉa kaj la filo travivis diboĉan vivon pro malĝojo. Li mortis en la jaro 1850 en Roma. Kiam Goethe sciigis pri tio li suferis sang-alfluan kaj mem antaŭvidis la morton. Li ankoraŭ finis „Poezio kaj Vero“ kaj „Faŭsto“ kaj post malvarmumiĝo mortis la 22. Marto 1832.

Lia korpo ripozas en la princa tombaro de Weimar.



La naskiĝdomo de Goethe en Frankfurt.

Hermano kaj Doroteo.

I. Kalliope.

Sorto kaj kompatemo.

„Straton kaj foirejon neniam mi vidis dezertaj
Kiel nun! ŝajnas al mi balaita, senviva la urbo!
Kvindek ne hejme restadis ĉiuj loĝantoj, mi kredas.
Kion ne kaŭzas sciolo! Nun ĉiu rapidas por vidi
La irantaron de l' forepeliĵoj tre malfeliĉegaj.
Ĝis la digvoĝo, de ili uzata ja unu horeto
Estas kaj oni en polvo varmega tagmeze kuregas
Tamen malsupren. Mi vere ne irus de tie ĉi, sole
Nur nor observi mizeron de tiuj senkulpaĵ migrantoj,
Kiu el lando transreĝna, la bela, savinta havaĝon
Sian, unu venas al ni kaj tramigras ĉi tiun feliĉan
Nian angulon de l' valo fruktodona kaj ĝiajn karbiĝojn.
Faris bonege, edzino, ke vi forsendis la filon,
Ke li alportu malnovan tolaĵon manĝaĵon, trinkaĵon
Al mizeruloj; ĉar por la riĉuloj konvenas donaci.
— Kiel la knabo veture dresadas la virajn ĉevalojn!
Estas tre bona vidoĵo, ĉu ne? Kaleseto la nova,
Spaĉon ĝi havas por kvar kaj ankoraŭ por veturigisto.
Sola foriris li nun kaj malpeze ĝi tien ruliĝis!“

Tiel al sia edzino la mastro „Al Ora Leono“
Diris, plezure sidante sub la foireja domporo:
Kaj la prudenta mastro, la sperta, al tio respondis:
„Mi ne volonte donacas tolaĵon de ni eluzitan;
Ofte ĝi estas utila kaj ne por monoĝi lavabla,
Kiam ĝin oni bezonas. — Bonvole mi donis hodiaŭ
Kelkan pli bonan peceton de lit- kaj ĉemizaj tolaĵoj;
Ĉar pri maljunaj kaj junaj mi aŭdis tutnudaĵ migrantoj.
Ĉu vi pardonos mia? Ŝrankon la vian sekrete elrabis
Mi ja, kaj vian domrobbon el plej delikata katuno,
Hindaj floretoj sur ĝi, delikata ĉifono interne.
Ankaŭ mi donis: ĝi estas malnova kaj ne plu laŭmoda.“
Sed la bonega dommastro pri tio ridetis kaj diris:

„Vere volonte ne perdis mi tiun katanun domrobbon
El orienta Hindujo; mi saman neniam ricevos.
Plu mi ne portis ĝin. Vere ja estas, ke viro nun ĉiam
Iru en botoj, surtuto, vidiga sin en la bekeĝo,
Kaj forigitaj ekstere nun estas pantofloj kaj ĉapo.“

La majstro-verkoj de Goethe.

Liaj ĉefverkoj estas „Ifigenio en Taurido“ (1787) „Torquato Tasso“ (1789), „Vilhelmo Meister“ 1777—1796, 1821, la tuto 1829), Hermano kaj Doroteo (1797), Faŭsto (1790, 1808, 1832 fino). „Ifigenio“ kaj „Hermano kaj Doroteo“ aperis en majstraj tradukoj de Zamenhof respektive de Küster en Esperanto. Lastatempe ankaŭ aperis „Faŭsto“ en multe laŭdita traduko de Barthelmeß, kaj komentario al „Faŭsto“ de M. Butin.

La enhavo de „Ifigenio“ bazas sur tragedio samtitola de l' greka dramisto Eŭripides.

„Torquato“ estas aminpentraĵo plene da pensoj pri vivo, moralo kaj arto. Ĝi karakterizas la konflikton inter la ideala animvivo kaj la ne-indulga realeco, do la diferencon inter idealismo kaj realismo.

„Vilhelmo Meister“ konsistas el du partoj. „La lernjaroj de Vilhelmo Meister“ estas romano pri eduko aŭ evoluo komparebla kun „Simplizissimus de Grummelshausen“. La dua parto „La jaroj de l' migrado de Vilhelmo Meister“ ne estas kompleta tuto. Ĝi ne temas pri opa homo, sed estas mondpercepta priskribo universala, abunda de profundaj pensoj pri la edukado de l' homo, pri la burĝa societo, la ŝtata vivo kaj socialaj problemoj. „Hermano kaj Doroteo“ estas heksametra eposo en naŭ ĉapitroj. La eposo korpigas la ideon, ke en la granda monda haoso oni devas sekurigi sian pozicion sur pli ĝi estas minacata kaj ke la familio estas la natura kaj sankta bazo de popolo kaj ŝtato. „Faŭsto“ bazas sur la historio pri Faŭsto, la stranga doktoro, vivinta dum la tempo de Luther kaj vaginta kiel sorĉisto, ĉarlatano kaj sanigisto tra Germanujo. Entute tamen malantaŭ ĉiu verso de „Faŭsto“ kaŝiĝas Goethe mem. Ĝi komencis ĝin, kiam li estis studento kaj finis ĝin en aĝo de 85 jaroj. Ĝi estas kombino de la Faŭst-a historio kun propraj travivaĵoj.

Resume: Goethe estis geniulo eksterordinare dotita de l' naturo. Liaj verkoj naskiĝintaj el propra travivo estas senmortaj atesoj pri nesuperebla homa kaj artistia evoluo. Lia universala spirito ne limigas lian famon je la landlimoj de sia patrolando, sed pasas ilin por etendiĝi trans la granda spirita sfero de l' kultur-mondo.

Robert Kreuz.

Ni reproduktas ĉi-tie bildon de Goethe el la tempo de sia ministreco, krome ilustraĵojn de lia naskiĝdomo.

Ni krome represas la 1. scenon de la 1. akto de „Ifigenio“ kaj kelkajn versojn de „Hermano kaj Doroteo“. Eĉ bonegaj tradukoj ne povas reprodukti ĉiujn nuancojn de originalo, sed laŭ kompetenta juĝo la tradukoj en Esperanto taŭgas plej bone por konatiĝi profunde al liaj verkoj. Al tiu, kiu interesiĝas pri la verkoj de Goethe mi rekomendas „Ifigenio“, eldonita de Esperantista Centra Librejo 51 rue de Clichy, Paris 9. „Hermano kaj Doroteo“ en la bonega literatura serio de Hirt & Sohn, Salomonstrasse 15, Leipzig kaj „Faŭsto“, havebla de la Eldona Fako de Senacieca Asocio Tutmonda (R. Lerchner, Colmsir 1, III r. Leipzig-Stö. (Germ) — La komentario al „Faŭsto“ estas havebla per la administracio de E.T.

Sesdeka datreveno de l' fondo de la Ruĝa Kruco.

La 22 aŭgusto 1864 estis subskribita la „Geneva Konvencio“ por la plibonigo de la sorto de la militvunditoj en la militraj armeoj. Preskaŭ ĉiuj ŝtatoj de la mondo aliĝis al tiu konvencio kaj donas bazon al la ruĝkruca institucio. La sinsekvaj militoj evidentiĝis pli kaj pli la sanktaron de la Ruĝa Kruco. Kvindek naciaj societoj estas nun oficiale akceptitaj, kaj se oni aldonas al tiu nombro la koloniajn Ruĝajn Krucojn, alligintajn al la metropoloj: Ruĝa Kruco de la britaj dominiĵoj, de Nederlanda Hindujo, de Belga Kongo, la sumo atingas proksimume 60; kaj ne plu ekzistas eĉ loko kie ne flirtas la ruĝkruca standardo.

La Ruĝa Kruco ne nur plivastiĝis laŭamplekse: ĝia konceptado plilarĝiĝis kaj ĝia rolo ne plu sin limigas je flegado de malsanuloj kaj vunditoj dum milittempo. Rimarkindaj estas la sinsekvaj transpasitaj etapoj. Ĉiu internacia konferenco de la Ruĝa Kruco signas novan progreson: Helpo en kazo de malfeliĉegaj okazintaĵoj, pristudita de la Berlina Konferenco en 1869 kaj restudita en St. Peterburgo en 1902; la batalo kontraŭ fizik ekzamenita en London en 1907. Kaj tiuj deziresprimoj ne restas sen sekvoj. Sufiĉas memori la katastrofon de Messina en 1908 kaj la fervoran rapidemon de ĉiuj landoj por sendi monhelpojn, kaj antaŭnelonge la malsategon en Ruslando, la tertermon en Japanujo, por konstatiĝi ke la universala interhelpo jam estas historia fakto.

La nova rolo de la Ruĝa Kruco jam sankciita de la art. 25 de l' kontrakto de la Ligo de Nacioj baldaŭ elmontriĝos ankoraŭ pli evidente: de post kelkaj monatoj ĉiuj registaroj studas la projekton de ĉiunacia entrepreno por reciproka helpo al la popoloj trafitaj de malfeliĉegoj. Konceptita de la Prezidanto de la Itala Ruĝa Kruco tiu nobla projekto sendube kondukos al subskrib-

ado de nova konvencio kiu reguligos la devojn de la Ruĝa Kruco en pactempe kiel la ĝenerala konvencio reguligas ĝiajn devojn en militotempo.

La Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco, kies sidejo estas en Genève, festis lastan monatan (aŭgusto la 22-an) la 60an datrevenon de sia fondiĝo. Ne estas sentule je tiu okazo memorigi, ke delonge tiu institucio antaŭvidis la utilecon kaj la gravecon de nia Esp. movado. Jam en 1906 kiam la franca leŭtenanto Bayol aperigis sian broŝuron „Esperanto kaj Ruĝa Kruco“, kiun li dediĉis al la tiama Prezidanto de la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco, s-o Moynier, la respondo estis tre kora kaj favora.

Post la milito en 1921, la X-a internacia konferenco de la Ruĝa Kruco alprenis gravan rezolucion favoran al Esperanto laŭ paragrafo 18a, kiu tekstas jene:

„Uzado de Esperanto“. Konsiderante, ke la baroj de la lingvoj multmaniere ĝenas la efektivecon de la internacia idealo de la Ruĝa Kruco ĉu en la entrepreno de helpoj sur la bataalkampoj, ĉu en tiu de la militkapitoj, aŭ eĉ en la konferencoj de la Ruĝa Kruco, la deka konferenco petas ĉiujn ruĝkrucajn organizaĵojn favori la studadon de la helplingvo Esperanto inter siaj membroj, precipe en la junularaj sekcioj kiel unu el la plej potencaj rimedoj por akceli internaciajn akordigojn kaj kunlaboradon en la kampo de la Ruĝa Kruco.“

Tiun jaron la Hispana Ruĝa Kruco starigis novan statutaron en kiun ĝi enkondukis ankaŭ favoran rezolucion jenan:

Art. 4 — La Instituto (La hispana Ruĝa Kruco, (Red.) klopodos en la jenaj kampoj: . . . paragr. 18) ĝi helpas la disvastigon de la universala lingvo „Esperanto“ same kiel la fondiĝon de la „junulara Ruĝa Kruco“, laŭ la rezolucioj kaj rekomendoj de la Internaciaj konferencoj

Tiu statuto aprobita oficiale de L. M. Generalo Primo de Rivera la 16 aprilo 1924, aperis en la „Gaceta de Madrid“ la 17 aprilo 1924.

Plie la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco jam de pluraj jaroj sendas regule delegitajn al la ĵaraj universalaj kongresoj de Esperanto kaj aperigis lastan jaron en sia revuo favoran artikolon pri Esperanto de unu el siaj eminentaj komitatanoj, s-o Lucien Gautier, nun mortinta. —

Kaj jen nova pruvo de tiu simpatio al nia movado: Interkonsentinte kun la monata Revuo de la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco, aper-

anta franclingve, UEA enmetos regule en sia organo „Esperanto“ la artikolojn transdonitajn de la ruĝa Kruco pri ĝia agado kaj reciproke la ruĝkruca revuo disponigos al UEA ĉiumonate unu paĝon por propagado de Esperanto.

Ni tre ĝojas pri tiu decido kiu konfirmas la favoreman sintenadon de la Ruĝa Kruco kontraŭ ni; en la aŭgusta numero de la ruĝkruca revuo jam aperis konsekvence la manifesto de la delegitaro en la porleĝa konferenco de Genève 1922. Ni esperas ke tiu reciproka kunlaborado fariĝos ĉiam pli grava.

Jen resume kelkaj informoj pri la agado de la Ruĝa Kruco deŝi ĝia fondiĝo. P. B., Genève.

Scienco. Mineralogio.

La diven-vergo sub scienca klarigo. (Komparu ET n-o 180).

La norvega verkisto Th. Klavens, kiu estas unu de niaj plej konataj psika esploristoj faros paroladon en la „Norvega asocio de psika esploro“ pri la diven-vergo.

Ni petis lin diri iomeie pri tiu ĉi tre malnova kaj pridiskutata temo.

Li eldiris:

„La teorio pri la divenvergo ĝis nun estis, ke la vergo faras sian flankigon kaŭze de senvola muskolmoviĝoj, kaŭzita de „klarvido“.

Kiam homoj — ne ĉiuj — kiuj posedas klarvid-povon, „vidas“ kie troviĝas akvo, kaŭzas la subkonscio, ke la bastoneto en la mano kurbiĝas. Tio ĉi estas la malnova teorio, kiu ĝis nun estis la ĝenerala.

Mi tre longe opinias, ke tio estas erara, kaj nun mi post longaj esploroj pruvis, ke tio efektive estas erara.

Mi konstruis tre simplan aparaton, kiu konsistas nur el du divenvergoj, unu vivanta kaj la dua artefarita, ili estas kunligitaj. La artefarita havas formon preskaŭ kiel la presita litero V kaj konsistas el du bastonetoj ki longeco de proksimume 18 coloj.

Vidiĝas, ke nur la vivanta vergo faras flankigon, la artefarita restas senmova. Se la teorio pri subkonscio estis ĝusta, kompreneble ambaŭ vergoj sin movus, ĉar oni ja insistis, ke la subkonscio kaŭzis la moviĝon de la vergo. Plue — mi interligis la vergon kun ĝradarko, kiu montras la flankigon. Per tio oni povas prilabori la rezultojn sciencem.

signoj de dekadenco montrantaj al venanta kulturkrizo. Da monatoj poste, postkiam oni en Paris estis aplaudiginta la unuan prezentadon de la ruzo dancita „Legendo de Josefo“ de la germana komponisto, komenciĝis la mondmilito. Ĝia sonaganta martelo transformis ĉion ekzistantan en novan formon. Ankaŭ la arto, ĉar tiel katastrofo de l' homaro ankaŭ estas katastrofo de l' kulturo. Komenciĝis nova tempo. Sed Richard Strauss ligita kun la esinteco por ĉiuj eroj de sia artisto eĉaro restis la iama, kaj tiel fariĝis subite — nekoneva. Tiel dum la unua militjaro „Alpsimfonio“ efikas kiel malforta posteajo de la instrumenta impresionismo de antaŭ du jardekoj, tiel teknike ĝi ligita prilaborado de „Ariadne“ senigas pli multe la internan nevaloron de artista dietaneco, tiel la nobla sed neklera fabelotelego de ankoraŭ verĵaĵo, „La virino sen ombro“, montris tiun belan klarecon, sed intermiksita kun afekcio, kiu karakterizas la evidentajn verkojn de maljunaĵoj el la parenco de Faust II. Por gratuli al la komponisto de „Schlagobers“ (Kirila kremo laŭ Wien-maniero) je la 60a naskiĝtago, ni tute ne havas kaŭzon; sed honoro la estran gvidadon de la germana muziko antaŭ la milito, tiun postulas justeco kaj dankemo.

Kaj kiun „formaton“ eble havas tiu granda Richard Strauss el la jaroj 1890, 1900, 1911, el kiu valoras nia festo? Ĉu li similas al Bach, al Beethoven, al Wagner? Aŭ ĉu eble nur al Rossini, al Mendelssohn? Ni bedaŭrinde estas rezigi pri respondo. Ĉar ja tiel granda ankoraŭ ne devas la historia distanco, ke oni povas fari tian kritikon. Laŭ historiaj komparoj tamen kelko estas dirinda. Richard Strauss estis tiel favorita de sunĝaja vivoj, kiel preskaŭ neniam iu alia gendito. Jam ĉe la elekto de siaj gepatroj li estis trege singardema: la patro estis eminenta München-a ĉambromuzikisto, la patrino filino de grandbierferisto Pschorr; do hereda talento kaj riĉeco ĉe la lulilo. Neniam iom da batalo en komuna vivo — aŭ aristomizero. La München-a kortega orkestro konsideris kiel honoro prezenti la verkojn de la komponanta gimnaziano. Kiel 25-jarulo li estis kortega muzikisto apud Hans v. Bülow en Meiningen. Poste en rapida kariero kiel kortega muzikestro en München kaj Berlin li fariĝas ĝenerala muzikdirektoro. Liaj simfonijaj poemoj ni ludataj de ĉiuj orkestroj, liaj kantoj kantataj de ĉiuj kantistoj, liaj operoj post la ŝiŝi — unua malsukceso estas sensacio. Ĉio kune estis maldizregataj kaj alte honoraritaj eldonadoj. Al tio aliĝis „taniemo-pluvo“. Fine li evoluigis al la plej supra muzikpotenculo en la Beethoven-urbo Wien. Titoloj kaj rango — honorigoj ĉiuspecaj, memorarboj, volumriĉaj biografioj kun multaj belaj paroladoj honoregantaj kiel ovacioj por la kvindekjarulo kaj nun eĉ sesdekjarulo sekvis unu la alian.

Fine estas demandinde, kion la artverko de la sesdekjara Strauss ankoraŭ signifas por ni hodiaŭ. Estas des pli demandinde, ĉar ni rekonis lin kiel viro de proksima kaj tamen ankaŭ strange malproksima pasinteco. Oni ja povus konsideri sufiĉe la rolon de naskiĝtago gratulato, per iom da patoso dirante la frazon pri tiu, kiu el la plej grandaj eminentuloj de sia tempo iam verkis sufiĉe. Sed tio koncerne Richard Strauss verne ne estas necesa. Granda parto de liaj verkoj apartenas al la fundamentoj de praktika muzikado.

Kaj fine li al ankoraŭ vivis kiel homa konato inter ni. Li ja estis ĉiam preskaŭ tiel forta vivaristo kiel sonaristo kaj sciis ĝojri pri la gloro kaj pri la idealaj kaj materialaj sukcesoj. Tiu homa memoreto kreis parton de lia artisto agado kiun oni ne forgesu menci kaj kiu multe influis esence la brillan karieron; ja muzikreĉo. Se Richard Strauss ne estus granda moderna komponisto, tiam li tamen devus esti honorata kiel granda moderna

Ĝis tie ni staras ĉe meĵa ŝtono en la historio de tiu ĉi esploro, ĉar la malnova teorio estas mortkondamnita.

Temas la fenomenon — ke la divenvergo entute faras flankigon je akvo aŭ metalo.

La problemo nun estas prezentata al la okulta fako kaj la esploro provos malkaŝi, kiuj fortoj faras la fenomenon.

Kiel mi scias, la divenvergo neniam trompis. Se oni ne trovis akvon ĉe la indikita loko, la kaŭzo estas, ke oni ne malsuprenfosis sufiĉe profunde.

Multaj ridejas pri la divenvergo, sed estas certe, ke oni tie staras antaŭ fortoj kaj leĝoj, kiujn neniu konas. Ni nur scias, ke ili ekzistas, ĝuste kiel ni scias pri magnetismo kaj elektro.

R. Horrisland, Iveland St. Krsand S.

Zologio.

Kiom da tempo vivas bestoj.

Ke la ĉevalo atingas aĝon de 40 ĝis 50, ja ofte ĝis 60 jaroj, estas al multaj nekonitaj, kiel oni ja entute havas malklarajn imagojn pri la aĝo de la bestoj. Tute certe oni ne povas respondi la demandojn pri la vivtempo de la bestoj ĉe ĉiuj specoj, sed ĉe tiuj ĉi, kiuj vivas kun ni en la domo aŭ en ĝardeno, kampo kaj arbaro ni povas tion pli facile. Rilate la mambestoj estas regulo, ke la pli grandaj bestoj fariĝas pli aĝaj ol la malgrandaj. Pli aĝa ol la ĉevalo fariĝas ĝia proksima parenco, la azeno, kiu povas atingi 100 jarojn. La mulo vivas 60 ĝis 70 jarojn. La bovo kontraŭe atingas nur 20—24 jarojn, la ŝafo 20, la kapro 25 jarojn. La plej fidela akompanato de la homo, la hundo vivas 24 ĝis 25 jarojn, la kato 22 ĝis 25. La patriarkoj inter la mambestoj estas samtempe niaj gigantoj, ĉe la elefanto kaj balenoj oni konstatis aĝon ĝis 200 jaroj. Pli bone konita estas la aĝo de la birdoj, sed ĉe ili la grandeco ne ludas tian rolon, kian ĝi, havas ĉe mambestoj.

Kokino vivas 15—20 jarojn, ansero kaj anaso 100 jarojn, rokaglo 100, cigno 105, cikono 70, merlo 30, kanario 25, papago 120 jarojn. Fiŝoj estas pleje mallongvivaj, sed kelkaj atingas rimarkinde altan aĝon, kiel ezoko kaj siluro, kiuj povas vivi 100 jarojn. Laŭdire karpoj atingas aĝon de 1000 jaroj. Ĉe amfibioj kaj insektoj la vidaŭro estas tre diversa. Laborabeloj atingas 6—8 semajnojn, abelreginoj 5 jarojn. Araneoj vivas 1 ĝis 2 jarojn, formikojn oni povas observi en mallibereco 15 jarojn. La lumbriko atingas 10, la hirudo preskaŭ 30, la astako (rivera kankro) 20 kaj la rano 10—12 jarojn.

Joh. Bernhard, München.

Richard Strauss sesdekjara.

Laŭ trad. de A. Naumann, Grossenhain (Sa.).

Richard Strauss, la komponisto de „Salome“ kaj „Rozokavalero“, naskiĝis la 11 junio 1864 en München. Li estas en la nuna momento, kiam oni lin honoras pro tio en Germanujo kaj eksterlande, jam tute „historia eminentulo“. Tion jam supraĵe montras la maniero, kiel oni festas la honortagon de la artisto. La brilo de preskaŭ ne pridubita gloro ĉirkaŭanta hodiaŭ la kapon de la honorato, la multego da honoradoj alvenantaj ĉe la naskiĝtago, neniam konvenas al personoj, kiuj ankoraŭ evoluigis, sed nur al personoj pretaj, evoluigitaĵoj.

Ni festas laŭ tiu ĉi certe en Richard Strauss la plej fortan, plej universalan tonarjistajn reprezentanton de la kulturo — pli bone: civilizacio — de la nuna jarcento. En malgrandaj kaj grandaj liaj nomoj verdoj personigas resonante la ideojn kaj emojn de tiu (por diri kun Lamprecht) „inĉiiga“ tempo tiel elaste elflekse. Ke li samtempe ne povis rifuzi la riproĉon, esti akcelato de la modo. La riproĉo estis nemotivita laŭ tio, ke ĝi intermiksita je certa punkto elikon kaj kaŭzon. Richard Strauss ne akcelis la modon, sed la modo siaflanke influis lin verkadon per tio, ke ĝi direktis la delikatajn nervojn de lia kreadorano kiel la servanto la montrilo de barometro al la iatempaj esintaj cirkonstancoj. Strauss ne laŭmoldiĝis, ĉar li volis, sed ĉar li devis aĝi tiamaniere laŭ sia eĉaro.

Tiel unue aliformiĝis ĉe li la drama naturalismo de jaroj 1880-1900 en la kunigo kun la pentrista impresionismo en la formon de liaj reismaj kol-regaj komponaĵoj simfonijaj dum la dek jaroj el l' kreado de „Don Juan“ ĝis la „Vivo de heroo“. En la elekto de materio eksonis ankaŭ la plej forta literatura kordo de la spirita tempogordo, la entuziasmo por Nietzsche, per muzika superhomeco kaj vera Zaratuŝto-simfonio. Tiel ekpreskis lia venkanta, impresa arkitanto el la sekdarda sentemliko kaj incitema sociala malricla tono de tiuj ĉi Bierbaum kaj Dehmel. Tiel li faris unuan kaj lastan koncesion al la Richard Wagner-kredo de la samtempa komponistgeneracio per sia memverkita romanik-hero-misika muzikdramo „Günther“. Alvenis la jarcentomenco kun la ankoraŭ grandiganta signifo de la teatro. Kiu nun ankoraŭ volis esti aŭtore de majo, devis provi tion en teatro aŭ en ĝia kontraŭaĵo, la ironianta kabaredo. Richard Strauss faris ambaŭon kaj kreis kun la estiganta kabaredisto Hans von Wolzogen la liber-eikan opernuktaĵon „Incendio“ faranta burleskan ĵuĝon filistran. Dum en kabaredo la ironio kaj la sekdardeco de la tempo estiĝis je maldelikata, nekŝajna sercado, tiam ĝi samtempe aliformiĝis je sanga sekdarda tragiko en nova formo de psikologia dramo. Wilde en „Salome“ kaj Hofmannsthal en „Elektra“ kreis gvidantej tendencverkojn de tiu speco, kaj Richard Strauss estis tiel kapita, ke li prenis ilin por la parolsceno, kaj per ilia gvidado li atingis la supraĵon de nova muzikdrama stilo resonanta el ĝia tuta ĝisnuna teknika kaj spirita evoluo. Sed ankaŭ la facilanimeco de tiuj tagoj kun ĝia duone konscia danco sur vulkano de kaŝita militeksplodo entuziasmigis lin ankoraŭfoje, kiam li per kunlaboro de Hofmannsthal en „Rozokavalero“ revokis malnovan Wien an rokologecon kaj kreis per tio la plej sukcesan modernan ĵanaron operan. Ke lin fine allogis ankaŭ la pure artistaj operoj de sia tempo, ke li ligis sin kun la regio-arto de Max Reinhardt, adorata de la teatromodo, per kio kreiĝis la stranga tragedikomika duspecaĵo „Ariadne“, kaj ke li poste kreis por dua modoj, por la Eŭropon triumfe vizitanta rusa balado, la pantomiman „Legendo pri Josefo“, tio jam estis

muzikestro. En tiu fako estante persona disĉiplo de Hans v. Bülow, de kreinto de la plej nova arto de muzikdirektado, li projektis ties heredaĵojn kiel memstaran karakterizaĵon. Li estas kiel muzikestro subjektivisto, tio signifas, ke li enigis multe da sia propra karaktero en la interpretadon, verkarjon. Tiel ankaŭ ĉiam venkos tio, kio karakterizas la sesdekjarulon Strauss entute: la granda forta personeco.

La Nobel-premiuloj.

En tiu gazeto ni trovis liston de ĉiuj Nobel-premiuloj deŝi la unua premiado. Ŝajnas al ni interese publikigi ĝin tie ĉi, ĉar ĝi montras laŭ kiu grado la diversaj nacioj partoprenas al la moderna kulturo.

Literaturo.

1901 Sully Prudhomme, 1902 T. Mommsen, 1903 Bj. Björnson, 1904 Frédéric Mistral kaj José Echegaray (puduone), 1905 Henryk Sienkiewicz, 1906 Giosuè Carducci, 1907 Rudyard Kipling, 1908 Rud Eucken, 1909 Selma Lagerlöf, 1910 Paul Heyse, 1911 M. Maeterlinck, 1912 Gerh. Hauptmann, 1913 Rabindranat Tagore, 1914 ne disdonita, 1915 Romain Rolland, 1916 Werner Heidenstam, 1917 K. Gierlerup kaj H. Pontoppidan (puduone), 1918 ne disdonita, 1919 C. Spitteler, 1920 Knut Hamsun, 1921 Anatole France, 1922 Jacinto Benavente, 1923 William Butler Yeats.

Fiziko.

1901 W. C. Roentgen, 1902 Hendrik Antoon Lorentz kaj Pieter Zeeman (puduone) 1903 H. Becquerel, Pierre Curie, Marie Curie (potrone) 1904 Lordo Rayleigh, 1905 Phil. Lenard, 1906 J. Thompson, 1907 Alb. Abt, Albr. Michelson, 1908 G. Lippmann, 1909 Gugl. Marconi kaj Ferd. Braun (puduone) 1910 J. D. Waaals, 1911 W. Wien, 1912 G. Dalen, 1913 Omnes Heike Kamerlingh, 1914 M. v. Laue, 1915 W. H. Bragg kaj W. L. Bragg (puduone) 1916 ne disdonita, 1917 Chas. G. Barkla, 1918 M. Planck, 1919 Joh. Stark, 1920 Ch. Ed. Guilleaume, 1921 Alb. Einstein, 1922 Niels Bohr, 1923 Rob. Millikan.

Kemio.

1901 Jak. Hendr. van 't Hoff, 1902 Emil Fischer, 1903 Svend A. Arrhenius, 1904 Sir Will. Ramsay, 1905 Ad. v. Bayer, 1906 Henri Moissan, 1907 Ed. Buchner, 1908 Ernest Rutherford, 1909 Will. Ostwald, 1910 Otto Wallach, 1911 Marie Curie, 1912 Victor Grignard, Paul Sabatier (puduone) 1913 Aldr. Werner, 1914 Th. W. Richards, 1915 Rich. Willstätter, 1916 kaj 1917 ne disdonita, 1918 Frih Haber, 1919 ne disdonita, 1920 Walther Nernst, 1921 Frederik Soddy, 1922 Francis Will. Aston, 1923 Frih Pregl.

Medicino.

1901 E. A. Behring, 1902 Sir Ronald Ross, 1903 Niels Ryberg Finsen, 1904 Ivan Petroviĉ Pawlow, 1905 Robert Koch, 1906 Camillo Golgi kaj Ramony Cajal, Santiago (puduone) 1907 Chal. L. Apli. Laveran, 1908 Paul Ehrlich, Elias Mechnikoff, (puduone) 1910 Albr. Cossel, 1911 Alvar Gullstrand, 1912 Alexis Carrel, 1913 Ch. Richet, 1914 Rob. Bárány, 1915—1918 ne disdonita, 1919 Jules Bordet, 1920 Aug. Krogh, 1921 ne disdonita, 1922 A. V. Hill kaj C. Meyerhof (puduone) 1923 F. G. Banting kaj J. R. Macleod.

Kaj Zamenhof? Tiel demandis rajte certa samideanaro en rezolucio por la Deksesa. Laŭ la statuto de la Instituto de Nobel-premioj sub specialaj kondiĉoj la premio povas ankaŭ esti donata al la postlasitoj de premiito. Do Privat tamen respondis al la proponitoj, ke la ŝancoj por sukcesoj koncerne la vidvinojn de nia majstro ne estas tre grandaj.

Aktuala politiko.

Kunsido de la Ligo de Nacioj.

La 1.9. estis malfermita la ĉi iara kunsido de la Ligo de Nacioj. La Reformacia Palaco en Genève estis plene. 44 delegacioj partoprenis la malferman kunsidon, sub la prezido de la belga ministro Hymans. Rimarkinde estas, ke inter la delegacioj ne estas malpli ol 16 nuntempe oficantaj ministraj prezidantoj. La konata angla ŝtatesto Lord Cecil, varma amiko de Esperanto, ne ĉeestis. Sed novaj tipoj ekinteresiĝis, inter kiuj speciale la gvidanto de la norvega delegacio Nansen, la konata esploristo, krome grafo Apponyi (Hungario), Lordo Parmoor (Anglujo), Salandra (Italujo). Specialan intereson oni dediĉis al la franca delegacio kun Bourgeois, Briand, Loucheur kaj la deputito Boncourt. De tiel nomataj malgrandaj nacioj ĉeestis ministro Beneš (Ĉeĥoslovakio). La intereso de la felicitonistoj koncentriĝis je la hindaj kaj abiseniaj reprezentantoj pompe vestitaj.

Por ni anoj de internacia helplingvo estas interesa la konstato de jena fakto. La sveda delegacio Branting laŭlegis france redaktitan raporton kaj faris kelkajn personajn rimarkojn. Ĉar li kelkfoje havis lingvajn malfacilaĵojn por esprimi sin en franca lingvo, la prezidanto franc-lingva Hymans devis helpi lin. Kiam oni iam en similaj kazoj uzos Esperanton? R. Kr.

Esperanto kaj la dana registaro.

La ĉefministro s-o Stauning kaj la defendministro s-o Rasmussen favora al Esperanto.

Jam antaŭ kelkaj monatoj la dana ĉefministro deklaris sin favore pri enkonduko de Esperanto en la danaj lernejoj. S-o Stauning diris: „Ni devus enkonduki Esperanton en la popollernejojn. Mi tre simpatias je la movado“.

Pasintan dimanĉon la dana defendministro s-o Laurs Rasmussen parolis dum pacpropaganda festo en arbaro apud Odense. Post la parolado ni profitis la okazon intervjui la ministrin pri Esperanto. Ĉar li estis tre okupata (tuj post manĝado li devis forvojaĝi) la interparolado estis tre mallonga.

Ni demandis:

„Ĉu vi, s-o Ministro, konas Esperanton kaj kiel estas via opinio pri la movado?“

„Mi ofte aŭdis pri Esperanto, eĉ mi ĉeestis paroladon en tiu ĉi lingvo, kaj mi konstatis la bezonon de tiu ĉi lingvo“.

„Ĉu vi, sinjoro, eble subtenos la movadon?“

„Jes, mi ĉiam estas preta subteni kaj helpi ĝin. Vi havas mian permeson ĉiam kaj ĉie propagandi inter la soldataro. Se eble iu oficiro aŭ aliaj malhepos vin, mi petas al vi tuj sciigi min pri tio.“

„Ĉu vi eble, s-o Ministro, instruos prezenti la demandon pri Esperanto kiel internacia kongres-kaj koresponda lingvo antaŭ la ĉefestraro de la dana socialdemokratia?“

„Ni jam diskutis iam pri la lingvo en la estraro, kaj eble mi iam reprezentos proponon pri tio.“

La ministro adiaŭis — la aŭtomobilo venis kaj rapide forveturis por atingi rapidvagonaron al København.

La ministro Laurs Rasmussen estas ankaŭ deputito de la dana parlamento kaj elektita en Fredericia. A. C.

Radio.

Reproso en nacilingvaj radio-gazetoj nepre rekomendata!

Internacia Radio-Asocio.

Prezidanto:
D-o P. Corret.

Sekretario:
H. A. Epton,
17 Chatsworth Road,
London, E. 5,
Anglujo.

Dua kaj tria bulteno (mallongigite).

Post longa kaj ofta interkorespondado dum du jaroj, inter nia Prezidanto, Sekretario, kaj Nacia Sekretario en Danujo, rilate al radio-aferoj, la Internacia Radio-Asocio estis fondita la unuan tagon de januaro 1924.

La unua grava ago de la I.R.A. okazis en februaro, kiam la American Radio Relay League, la plej granda amatora radio-organizaĵo en la mondo, kiu sin interesis pri la internacia lingva demando, dissendis inter la naciaj radio-societoj cirkuleron pri tiu demando, en kiu ĝi rekomendis la adopton de alia lingvo krom Esperanto kaj petis opiniojn de la koncernitaj societoj. Tamen, antaŭ ol decido, ĝi deziris scii, kiel la diversaj internaciaj lingvoj estas disvastigitaj tra la mondo.

Tiun peton ni sciigis al niaj membroj. Sekve de tio, la A.R.R.L. ricevis centojn da leteroj el ĉiu parto de la mondo pri Esperanto, multaj de personoj kun grava publika ofico. Krom tio, preskaŭ ĉiu nacia radio-societo, kiu respondis al la peto de la A.R.R.L., subtenis Esperanton, kaj neniu subtenis alian artefaritan lingvon.

Grandaj sukcesoj en radio-sfero.

American Radio Relay League definitive akceptis Esperanton.

Antaŭ kelkaj monatoj la eŭropa gazetaro disvastigis la informon, ke la konata amerika radio-societo American Radio Relay League kun pli ol 15 000 membroj interesiĝis pri la problemoj de internacia radio-helplingvo kaj emas favorigi Idon.

Kompetentaj samideanoj intertempe informis la estraron de la societo pri la etendiĝo de la Esperanto-movado kaj la jama praktika aplikado de Esperanto en radio-rondoj.

Post ekzameno de la estraro nun sciigis, ke ĝi definitive akceptas Esperanton kiel radio-helplingvon kaj decidis rekomendi ĝin por akcepto al la Internacia Unio de Radio-Amatoroj, kies unua kongreso okazos pentekoston 1925 en Pariso.

Amerika radio-revuo kun pli ol 300 000 legantoj por Esperanto.

Unu el la gvidantaj usonaj radio-revuoj „Radio-News“ en New-York, kiu aperas en eldono de pli ol 300 000 ekzempleroj post serio da artikoloj pri Ido kaj Esperanto akceptis Esperanton kiel internacian radio-helplingvon. La aŭgusta kajero de tiu ĉi revuo enhavas pri tio oficialan deklaron de la redakcio. En sama kajero aperis artikolo de nia pioniro J. D. Sayers pri Esperanto kaj du-lingve (Esperante kaj angle) la radio-parolado de s-o Sayers, laste farita de la stacio.

Internacia Amatora Radio-Unio.

Intertempe okazis en Pariso dum marto kunveno de diversnaciaj radio-societoj por bonvenigi s-on Hiram P. Maxim, Prezidanto de A.R.R.L. Ĉe tiu kunveno oni diskutis la fondon de internacia unio de amatoraj societoj kaj la ideon pri internacia lingvo por radio. Oni starigis komitaton por aranĝi internacian konferencon de la nove fondita Unio en Paris venontan Paskon, kiam oni diskutos konstitucion kaj internacian lingvon. Niaj membroj do povos vidi la gravecon de tiu konferenco, kaj estas ilia devo montri al sia nacia societo la dezirindecon de Esperanto, kaj ricevi ĝian aprobon kiam la afero estos diskutata.

Brita reĝa parolado ĉe ekspozicio Wembley.

Kiam estis anoncote, ke la Reĝo de Britujo faros gravan paroladon ĉe la grandega Ekspozicio en Wembley je 23 aprilo, nia Sekretario interlatis ĝin kun la Brita Brodkasto Kompanio kaj aranĝis Esperanto-tradukon de tiu parolado. Li tuj dissendis cirkuleron al membroj de I.R.A. kaj al ĉiu esperanta gazeto, kaj tuj alvoko estis tradukita en multajn naciajn lingvojn kaj represitaj en naciaj gazetoj. La Esperanta traduko estis brodkastita la saman nokton de nia Sekretario, kaj estis aŭditaj kaj komprenita de miloj de personoj en 12 landoj, de Finnlando ĝis Tunizio. La Esperanto-traduko estis grandega sukceso, kaj la B.B.K. ricevis multajn gratulajn leterojn pri sia entreprenemo.

Membroj de I.R.A.

Ĉiutage la membraro kreskas, kaj nun estas pli ol 300 membroj en 26 landoj. Ni unue intencis presigi liston de membroj, sed la laboro estas tiel granda, ke ni devis prokrasti ĝin. La kotizaĵo estas tiel malalta (1 svisa franko), ke ĉiu samideano interesata pri radio en ĉiu lando devus aliĝi.

Nacia Sekretario.

Oni frue konsciis, ke la organiza laboro estas tro granda por unu homo, kaj oni do decidis starigi, kie eble, Nacian Sekretarion, kiu reprezentos en sia lando la I.R.A., varbas membrojn, kaj faras radio-propagandon. Tiu persono devas havi scion pri radio kaj Esperanto, kaj posedi se eble (kie permesate) sendan aŭ almenaŭ ricevan aparaton.

Jen la ĝisdata listo de Naciaj Sekretarioj. Pluajn oni nuntempe negocas. Britujo: H. A. Epton, 17 Chatsworth Road, London, E. 5, Anglujo; Ĉeĥoslovakio: A. Pitlik, Křemencová 17, Praha II; Danujo: P. Lendorfi, (O. K. E.), Dybolsgade 55, København B; Francujo: C. Rousseau, 4 Place de la République, Levallois-Peret (Seine); Hispanujo: F. Soler, Ceftelegrafisto, Centro de Telegrafos, Valencia; Nederlando: Ir. J. R. G. Isbrucker, v. Ferverningsraat 10, 's-Gravenhage; Irlando: F. R. A. McCormick, 5 Mount Eden Road, Donnybrook, Dublin; Italujo: G. Saggiori, Corse Vittorio Em. II, N. 6, Padova; Jugoslavia: Nikola Lisac, Vic-Prez. de I.L.E.P., Rogatica, Bosnio; Kanado: C. C. McFarquhar (C. 500), 163 University Avenue, Toronto; Usono: E. Jay Quimby (President of Radio Association of Greater New York), 587 West 181 st. Street, New York City, U. S. A.

Radio-kondiĉoj en diversaj landoj.

En ĉiu lando la reguloj pri radio estas malsamaj; en kelkaj landoj, ekzemple en Britujo, Usono, Francujo, Nederlando, la reguloj estas pli-malpli liberaj, sed en aliaj landoj oni malpermesas la uzon de sendaparato, kaj en ankoraŭ aliaj landoj eĉ ne ricevaparaton. Kompreneble ĉiu lando havas siajn proprajn malfacilaĵojn, sed radio tiom disvastiĝas, ke la malpermesantaj landoj grade enkondukos novajn plifacilajn regulojn.

La I.R.A. en tiu sfero trovas tre gravan okazon por utileco, per internacia diskonigo de la plej lastaj radio-novaĵoj. Ekzemple, en Hispanujo oni ĵus enkondukis novan leĝordonon pri radio. La Nacia Sekretario por Hispanujo sendis al la Brita Sek. Esperantan resumon kaj tuj ĝin tradukis anglan kaj dissendis al ĉiu radio-gazeto brita. Baldaŭ, kiam nova progreso aŭ leĝo okazos en tiu lando, la koncernita Sek. povos dissendi Esperantan resumon inter aliaj

naciaj sekretarioj, kiuj saviĉe ĝin tradukos nacilingven kaj dissendas al lokaj gazetoj. Per tio, la radiuloj povos vidi la utilecon kaj valoron de Esperanto.

Internacia Radiotelefona disaŭdigo.

Multaj radiofonaj paroladoj pri kaj en Esperanto jam okazis ĉe radio-stacioj; ĉe kelkaj oni dissendas lecionojn pri Esperanto. Kun la progreso de radiotelefonio la bezono por internacia lingvo estas pli kaj pli sentata. Grandaj stacioj, kiel la britaj (speciale la nova eksperimenta alt-potencia stacio ĉe Chelmsford), la franca Radio-Paris, kaj aliaj estas aŭdeblaj en multaj landoj, sed la plej granda baro estas la lingva diverseco. Ĉe internacia konferenco, kiu okazis en Genève dum Pasko pri Radiotelefonio kie kelkaj delegitoj parolis Esperanton, oni unuanime rekomendis la adopton de Esperanto ĉe ĉiu radiostacio kaj la regulan dissendon en Esp.

Kiel lasta vorto, ni petas, ke ĉiu ano de I.R.A. propagandu inter siaj esperantaj amikoj, ke ili interesiĝu pri tiu nova kaj alloga scienco, Radio, kaj inter siaj radio amikoj nian helplingvon Esperanto. La estonto por Esperanto estas ĉe Radio, kaj Radio efektive ne povos progresi sen Esperanto.

American Radio Relay League.

Kiam ni eldonis nian lastan Bultenon, ni ne kredis, ke ni tiel rapide eldonos pluan Bultenon. Tamen, la aferoj marŝas tre rapide.

En nia lasta Bulteno ni raportis, ke la A.R.R.L. emis subteno Esperanton por radio-celoj. Ĝis ni ekscias, ke tiu Ligo en ĉiujara kunveno de siaj direktoroj je fino de julio, decidis oficiale rekomendi Esperanton kiel la Internacian Lingvon adoptitan de la Internacia amatora Radio-Unio.

Tio estas eble la plej grava sukceso kiun ni atingis en la radio-movado, kaj ĝi estu konata tra la tuta mondo.

Mi petas, ke oni tuj informu ĉiun lokan gazeton, speciale la radiajn gazetojn, pri tiu novaĵo, ankaŭ la lokan Esperanto gazeton.

Internacia Amatora Radio-Unio.

La provizora Komitato de tiu Unio, kiu konsistas el naciaj radio-societoj en diversaj landoj, decidis aranĝi sian unuan Internacian Konferencon en Pariso dum Pasko 1925, kiam unu el la gravaj temoj diskutotaj estos tiu de internacia lingvo.

Estas proponite, ke la I.R.A. tenu samtempe en Parizo sian unuan Konferencon, por montri al la aliaj, ke Esperanto estas plene taŭga kiel la internacia lingvo. Por sukcesigi nian Konferencon, sufiĉe granda nombro da samideanoj devus veni. Mi petas, ke ĉiu persono kiu kredas, ke ĝi povos veni al Pariso informu min kiel eble plej baldaŭ pri tio, por ke mi sciu kiam aranĝojn mi devas fari. Pluajn detalojn mi volonte donos.

Harry A. Epton, Sekretario.

Radio en Polujo.

Post kiam la pola Registaro allogis fine al ĝenerala uzo la radio-servon, komencis aperadi en Warszawa dusemajna gazeto destinita al radio-aferoj, titolita „Radio-Amatoro“.

Ĉar estas intenco inkliningi la redakcion al malfermo de speciala Esperanto-fako, ĉiuj radiuloj el ĉiuj landoj kaj kontinentoj estas petataj sendi al la redakcio kelkajn vortojn de gratulo, petante samtempe pri alsendo de specimena numero.

La adreso estas sekvanta: Radio-Amator, Warszawa, Krakowskie-Przedmieście 17, Polujo.

W. P., Łódź.

Vigla intereso por Esperanto inter radio-amatoroj.

La germana radio-revuo „Der Deutscher Rundfunk“ faris enketon inter siaj legantoj pri programdeziroj. Alvenis multege da leroj kaj petoj. Por ni estas interese, ke laŭ propra informo de la revuo en sia numero de 1^o 31. 8. 30% da proponoj pledas por Esperanto. La intereso por aliaj lingvoj rimarkinde esprimiĝas per la cifero 25,7%.

Supozeble la samideano de Berlino ne mankos por eluzi tiun ĉi fakton.

Esperanta radio-parolado pri la IX. Foiro de Praha.

Dimanĉon la 21 septembro 1924 sur ondo 1150 disaŭdigos „Radio-Journal“ de Praha (Kbely apud Praha) diverslingvajn anoncojn pri la ĵus okazanta malfermo de la IX. Internacia foiro de Praha. La anoncado komencos je la 11 h. (centro-eŭropa horo) ĉehlingve kaj kiel lasta okazos je la 11 h. 45 m kvinminuta parolado radiofona en Esperanto pri la foiro de s-o Pitlik.

Car la nomita radio-anonco estos samtempe konkuro pri la radiofona taŭgeco de diversaj lingvoj eŭropaj kaj Esperanto estas urĝege petataj ĉiuj samideanoj tuj sendi al s-o A. Pitlik (Praha II, Křemencova 17) sciigon pri la aŭskultado kaj nacian ĵurnalon, enĉevantan anoncon pri la okazonta aŭ okazinta parolado. La senditaĵojn Radio-Journal ekspozos en la foira radiopavilono la 21.—28. IX. La sendintoj ricevos senpage ilustriajn informilojn pri Praha kaj Ĉeĥoslovakio. La venko de Esperanto kiel radiofona lingvo internacia dependas de via rapida kaj preciza helpo. Montru per multaj sendaĵoj ke sole Esperanto estas taŭga por eksterlanda radiofona propagando!

La pola registaro kaj la Zamenhof monumento.

La tutmonda Esperantistaro legos kun plezuro pri la decido de la Pola Registaro; cedi al la peto de la Organiza Komitato ke estu permesite ke la monumento starigota al D-o Zamenhof, kiu estas nun fabrikata en Aberdeen, eniru Polujon sen iu dogantakso. Jen traduko de letero, ricevita de la loka pormonumenta komitato en Warszawa de l' Ministerio Financa:

Ministerio de Financoj
Departamento de Importoj Warszawa, la 25. 6. 24
DC/4958/11/24.

Favore al peto de la Organiza Komitato por starigo de Monumento al D-o Ludovik Zamenhof, la Financa Ministerio komunikas, ke ĝi samtempe sub la sama numero rajtigas la Direkcion de Importoj en Warszawa al liberigo de limimpostago por la menciita Monumento.

La Monumento devas esti direktita al la Imporia Oficejo en Warszawa.

Por la Financa Ministerio
La Direktoro de la Departamento de Importoj (Subskribo)

De la Pola legacio en London mi ankaŭ ricevis la sekvantan oficialan leteron:

„Poselstwo Polskie“
No. A. 1247 London, 25 julio 24.

Estimata Sinjoro!
Mi havas la grandan plezuron povi informi vin, ke la Pola Registaro cedis vian peton por permeso eniri en Polujon sen iu dogantakso la monumenton starigotan sur la tombo de D-o Zamenhof en Warszawa.

La respektiva ordono No. DC/4958/11/24 estis dekretita de la direktoro de Importoj de la Financa Ministerio en Warszawa, la 25 junio 1924.

Fine kaj konforme kun la instrukcioj ricevitaĵoj el Warszawa mi estas dankaj al vi, se vi bonvolos sciigi al mi la nomon de la Skulptisto de la monumento.

E. Raczynski
1-a Sekretario de la Legacio.

Al J. D. Applebaum
Hon. Sek. de la Organiza Komitato
por Zamenhof Monumento
11 Mayville Rd, Mossley Hill, Liverpool.
J. D. Applebaum, Liverpool.

Lingva Komitato kaj Akademio.

De s-o Prof. Grosjean-Maupin ni ricevis la sekvantan deklaron, kiun ni represas fie ĉi por kontentigi multajn demandojn pri tiu ĉi afero:

Oficiala Klasika Libro.

„La Lingvaj Institucioj ne devas esti konsiderataj kiel respondecaj pri la prokrasto de la publikigo de la Oficiala Klasiko Libro (franca, angla kaj germana partoj), kiu devis aperi antaŭ la XVI. Kongreso. La manuskripto de tiu verko estis efektive melita en la manojn de la eldonisto dum decembro 1925. Sed malgraŭ la insistaj postuloj de la aŭtoroj, malgraŭ la specialaj promesoj de la eldonisto kaj de l' presisto nur la duaj presprovaĵoj estas ĵus ricevitaĵoj de la aŭtoroj.“

Esperable la Libro tamen aperos baldaŭ, ĉar ĝi estas nepre necesa al seriozaj defendantoj de nia lingva unueco.

Esperanto kaj gramofondiskoj.

Rilate al miaj du antaŭaj artikoloj pri Esperanto kaj la gramofono, plaĉis al mi ricevi antaŭ ne longe de s-o Epton de la Brita E. A., leteron dirante ke speciala komitato de la B. E. A. konsideras la aferon.

Estas ankoraŭ alia flanko de la gramofonuzado kiun mi ne antaŭe pritraktas.

Uzantoj de la fruaj fonografoj cilindraj (ekz. la uzona „Edison Gem“) memoras ke oni povis fari ŝatindajn vakcilojn ĉe hejme per simpla instalaĵo tre facile adaptita al tiuj maŝinoj.

Sed mankas tiu aparato rilate al la gramofono. Mi opinias ke, almenaŭ en Anglujo, la grandaj kompanioj fabrikantaj diskojn malhelpas ĉiamaniere la disdonadon de tia aparato, fimante ke ĝi eble malgrandigas la acetadon de iliaj produktaĵoj. Sammaniere ili nun penas „mortigi“ la mirandan elpensadon, kiu ebligas ke diskoj entenu pli da muziko ktp. ol ordinaraĵ diskoj.

Se mi povas havigi la rimedon tre plaĉas al mi komenci „gramofonkorespondadon“ kun eksterlanda Esperantista gramofonuzanto. Mi opinias ankaŭ ke tiu estas bona ideo por uzi la internaciecon de nia lingvo praktike. Certe tre interesus al grupoj, kluboj kaj socialaj rondoj interŝanĝi memfaritajn diskojn, kaj kutimigi ilin al fremda parolado.

Cu iu scias pri aparato, facile fiksebla al ne-trumpeta gramofono, per kiu oni povas fari vaksajn diskojn hejme? La metaldiskon „Kodisk“ mi jam malsukcese provis. Iu helpulo bonvolu skribi al s-o W. R. Wood, 2, Lpt on Vale Terrace, Torquay, Anglujo.

Por aktualigi ET
ni bezonas mallongajn tradukojn aŭ originalojn praktikajn el plej diversaj sferoj. Interesatoj bonvolu subteni nin aktive.

Esperantistoj, atentu!
Du gravaj okazoj.

Graz, la ĉarma ĉefurbo de la verda Stirio, de la 18 aŭgusto ĝis 24 septembro 1924 gastigos du gravajn kongresojn internaciajn, sciu

1. la kongreson por subpremo de la komerco pri virinoj kaj infanoj aranĝata de „International Bureau of the Suppression of the Trafik in Women and Children“, London, S. W. 1, 76 Viktoria street.)

2. la kongreson por forigo de la polica reguligo de la prostitucio (aranĝata de „Federation Abolitionniste Internationale“, Genève, 3, rue du vieux collège).

Estus tre dezirinde, ke ankaŭ tiuj ĉi kongresoj lernu bedaŭri, ke ili ne jam scias uzi la lingvon de internaciaj kongresoj, se ne okazos, ke diverslandaj samideanoj partoprenos la kongresojn, almenaŭ la unuan, kiu plugas kampon necesege bezonatan Esperanton, kaj esperantlingve vigle diskutados.

Aligu almenaŭ kiel eble plej multaj geesperantistoj, skribante al la preparanta „Österreichs Völkerwacht, Graz, Richard Wagner-gasse 5“ en Esperanto kaj atentigante pri la gravegeco de Esperanto speciale por la celo de la unua kongreso kaj de la ĝin aranĝanta societo internacia. Ne forgesu rimarkigi, ke en Graz estas delegito de UEA, kiu volonte helpos la tradukadon de esperantlingvaj poŝtaĵoj. Lia adreso estas: D-o Adolf Halbedl, Graz, Schulgasse 24.

La kongreskartoj kostas po 2 s. f. por aŭstroj, balkananoj, ĉeĥoslovakoj, germanoj, hungaroj kaj poloj, por aliaj 5 s. f.

La organiza komitato zorgos pri ĉio necesa, ekz. pri loĝejoj, eble senpagaj por la kongresanoj el landoj kun malbona valuto.

La kongreskartoj ankaŭ havigas rabatojn pri la pasportaj kaj fervojaj pagoj en Aŭstrio.

Se vi ne povas alie subteni miajn klopodojn mi petas vin insiste, skribu almenaŭ tuj poŝtkarton al la preparanta societo — adreso pli supre — varme rekomendante Esperanton por la celo de la protektado de vojaĝantaj kaj elmigrantaj virinoj.

D-o Adolf Halbedl, Graz.

Postskribo de la Redakcio: La Internacia Oficejo por subpremo de komerco pri virinoj kaj infanoj antaŭ la milito en 1913 jam dissendis presaĵojn en Esperanto.

La Deksesa.

Profunda dormo post terura sonĝo. — Impresoj pri Zagreb.

„Nu, samideano, ĉu bone vi dormis?“

Jen la unua demando de zagrebaĵ samideanoj, kiam mi aperis en la statistika oficejo, kie deĵoras s-oano D-o Maruzzi.

Ĉu mi dormis? Jes, profunde mi dormis preskaŭ ĝis tagmezo.

Hieraŭ vespere lacega mi falis sur la lito. Mi ekdormis baldaŭ, sed havis teruran sonĝon. Mi fantazis. Mi kuŝis en kabanaco, sur malseka pajlo, kaj puloj, cimoj, pedikoj kaj ĉiaj aliaj bestetoj turmentis min diable. Kaj apud mia lito sidis sorĉistino kun mabelega vizaĝo, kun longa kurva nazo kaj kun arancee maldikaj fingroj, per kiuj ŝi jetis iun bruligantan pulvoron en mian gorĝon — ŝajne estis papriko, kiun la hungaroj tiel ŝatas sed kiun mi en pli granda kvanto abomenas.

Poste aperis leonoj kun terura faŭko, kiajn mi vidis sur ponto en Budapeŝt; sed ili ne havis langon. Kaj subite ekstaris antaŭ mi ankaŭ la malfeĉa majstro, kiu skulptis tiujn leonojn kaj, post fino de la verko konstatinte, ke li forgesis la langojn, mortigis sin.

Kaj aliaj fantomoj formiĝis; sed ili estis jam malpli timigaj. Estis tabuloj kun lumaj ciferoj, desegnaĵoj ktp., kiuj levigis kaj mallevigis en la mallumo.

Unue aperis tabulo kun nombro „XVI“-a; poste alia kun indiko „1000 dolara deflito“; tria portis grandan demandosignon, kvazaŭ ĝi volus demandi: „Kiam komenciĝos la kongreso?“ aŭ: „Kie okazos la XVII-a?“

Sur kvara estis desegnita kokoviro „kokokokanta“¹⁾; kvina montris viron, kiu forjetas sian monon milionope, kaj havis subskribon: „La malŝparulo“; sur sesa oni vidis domojn timige altajn, t. n. „nubgratantojn“, kaj ĝi havis la subskribon „Urbo de l' Estoneco“²⁾.

Sepa estis mangokarto, kiu rekomendis menuon por 60000 kronoj; oka estis tute nigra kaj portis la vortojn: „Interkonatiĝa vespero en Wien“³⁾.

Kaj tio daŭris preskaŭ senfine. Novaj kaj novaj tabuloj aperis kaj malaperis.

Sed fine tamen la vera milda feino de l' dormo alŝvebis kaj ŝutis sian benon super miajn febrantajn korpon kaj ĉerbon, tiel ke la fantaziaĵoj ĉesis kaj mi ne vekigiĝis antaŭ la deknua kaj duona de l' mardo.

Ĉu mi dormis? Jes, efektive mi dormegis; sed mi ja bezonis la dormon.

La posttagmezon de tiu bela tago, mardo, 19 aŭgusto, la zagrebaĵ samideanoj bonvolis montri al mi sian interesan urbon: la ĉefan komercan straton „Ilica“, la ĉefan placon „Jelačić-trg“, la belan bulvardon, kiu kondukas de la stacidomo al la Ilica, kun nomo „Zrinjevac“ aŭ „Zrinski-trg“, kie vespere post la sesa horo regas vere grandurba trafiko, kie sidas centoj da homoj sur benkoj kaj seĝoj sub ombraj arboj kaj kie miloj da belaj kroatioj kaj viglaj kroatoj promenadas, miksite kun serboj, slovenoj, germanoj, hungaroj, italoj, rusoj ktp. Rava estas ankaŭ rigardo de la supra urbo sur la malsupran kun ĝiaj preĝejoj, teatro, domaro ktp.

Vespere je malfrua horo ekpluvis. Sed ni sidis ŝirmite en bona kafejo „Corso“ ĉe botelo da „Château Opeka, vin blanc à la Bourgogne“, kiun nia s-ano D-o Maruzzi rekomendis al ni kiel bongustan sudslavan vinon.

Merkredo forpasis sen grandsignifaj okazaĵoj. Matene mi rigardis la kolorriĉan foiran trafikon sur Jelačić-placo, kie la kamparanoj de la ĉirkaŭaĵo, vesifitaj per naciaj kostumoj, vendis florojn, fruktojn ktp.

Posttagmeze mi sidis en la oficejo de D-o Maruzzi, kie li afable disponigis al mi ĉambron, paperon kaj ĉion bezonan, kaj kie mi daŭrigis mian raporton ĝis tiu ĉi punkto.

Universala Kongreso en Zagreb?

Mi aŭdis de la zagrebaĵ samideanoj, ke ili intencas inviti iun venontan Universalan Kongreson de Esperanto al sia urbo. Tiu ideo estas konsiderinda.

Zagreb estas la kultura centro de Jugoslavio, kaj Universala Kongreso en Zagreb havus grandan efikon en la tuta balkano. Cetere Zagreb mem estas ankoraŭ tute eŭropa, kvankam ne tre granda urbo.

Mi iom timas pri la taŭga loĝigo de kelkmiloj da kongresanoj. Sed la zagrebaĵ samideanoj certigis min, ke en okazo de bezono oni povus nepre prizorgi sufiĉe da puraj loĝejoj, kaj ke ankaŭ kelkaj grandaj modernaj hoteloj estas konstruitaj, el kiuj unu tuj apud la stacidomo — kiel mi poste mem konstatis — estas jam preskaŭ finita.

La urbo estas bele kuŝanta ĉe la rando de montaro Sljeme; ĝi konsistas el pli granda malsupra kaj malpli granda supra urbopartoj. De la lastemomila oni havas ravantan perspektivon super la malsupran urbon, kiel mi jam menciis.

Krom Zagreb ekzistas ankoraŭ du simile grandaj urboj en Jugoslavio: la politika centro Beograd, kiu tamen pro multaj motivoj ne estas konsiderinde kiel urbo de Universala Kongreso, kaj la nun malmulte signifa urbo Subotica (fame Sabatka aŭ Maria-Theresiopol). Do, se oni intencas foje okazigi Universalan Kongreson en Jugoslavio, ĝi certe povus okazi nur en Zagreb.

Teo Jung.

¹⁾ En laborkunsido de la XVI-a iu samideano plendis, ke oni nur „kokokokas“ (parolas pri K. K. K.) sed ne laboras efektive.

²⁾ Iu firmao elmontris dum la XVI-a siajn ludilojn, per kiuj oni povus konstrui la „Urbon de l' Estoneco“.

³⁾ Okaze de la interkonatiĝa vespero oni malfunkciigis la elektran lumon iam tre true, per tio kvazaŭ forpelante la mirigiajn kongresanojn.

Agento por Hispanujo.

Por faciligi al niaj hispanaj amikoj la abondon al ET kaj esperante, ke per propra agentejo nia hispana legataro pligrandigos konsiderinde, ni transdonis nian agentecon al

S-o Ferdinando Montserrat
Villarreal 107, 2º, 2a,
Barcelona.

Niaj samideanoj en Hispanujo do povos aboni kaj reaboni pere de nia agentejo.

Admonoj pri abonfiniĝoj tamen estas ankoraŭ farataj de ni mem. Administracio de ET.

Esperanto en reklamo konkuro.

Kiom konata kaj disvastigita estas Esperanto... Kiom konata kaj disvastigita estas Esperanto...

Alvenis ne malpli ol 624 857 sendaĵoj. Rimarkeinde estas, ke laŭ publika informo de la entrepreno en multaj grandaj gazetoj germanaj...

Per tio la entrepreno faris dankindan propagandon por Esperanto.

Al la tutmonda esperantistaro.

La movado en Danujo ne estas tiel forta, kiel ni povus deziri. Pro propaganda celo oni en Odense deziras akiri objektojn por rondiranta ekspozicio, t. e. societoj en Danujo, dezirante aranĝi Esperanto-ekspozicion pro propaganda, povos senkomste pruntepreni la objektojn de ni.

Ni esperas, ke la esperantistaro komprenos la signifon de la demando. Fortigu la movadon en la nordo! Kun danko la donacajoj estos ricevatataj de s-o Alfred Christensen, Kastanievej 32, Odense, Danujo.

Kroniko.

Europo. Aŭstrio.

Graz. La 5 de aŭg. nekutime granda nombro da esperantistoj ĉeestis la solenan inaŭguracion de nia flago...

Cehoslovakio.

Kratzau apud Reichenberg. Fondiĝis nova grupo „Verda Sielo“ konsistanta el junaj, viglaj gesamideanoj.

Germanujo.

Loka unuigo Dresden de G. S. A. En la monata kunveno merkredon la 27. 8. en la malnova urbkonsilosalono raportis f-lino Zschepank en sia elokventa maniero pri la XVI-a kongreso Wien.

Magdeburg. En nia urbo fondiĝis nova Esp.-Klubo „Verda Lumo“. Ĝis nun aliĝis 10 esperantistoj. Per tio en Magdeburg nun estas 5 Esp.-grupoj: 1 loka grupo de l' Germ.-Esp.-Asocio, 1 loka grupo de l' Laborista Esp.-Asocio por la germanlingva teritorio, kaj la Esperantista-Klubo „Verda Lumo“ (neŭtrala). Klubadreso de „Verda Lumo“ estas: S-o Bruno Jauer, Magdeburg-S, Friedenstr. 8, Germanujo.

Kaiserslautern. Ĉi tie estas fondita loka grupo de la Germana Esperanto-Asocio, nombrante 22 membrojn. Adreso: Germana Esperanto-Asocio, loka grupo Kaiserslautern, Otosir. 1. Kunvenoj okazas ĉiumerkrede je la 8 h. en restoracio Föhner, Glockengasse 67. La 7-an de septembro okazis granda propagandociklunveno.

Jugoslavio.

Mostar. Fondita estas Esperanta klubo, en kies komitato estas jenaj elektitaj: prez. s-o H. Muhamed Behlilović, vicprezid. s-o Lav. Sešel, sekretario s-o Danilo Trkulja, bibliotekistino f-lino Zora Mihčić, kasisto s-o Rafo Sapina. Kontrola komitato s-o Nikola Jerić kaj filino Bernardica Merdžo. En venonta sezono estos malfermitaj Esp. kursoj.

Hispanujo. Katalunujo.

Barcelona. La 12-a aŭgusto, ĉe Aienue Enciclopedic Popular nia talenta pioniro Jaume Grau Casas faris paroladon pri la temo: Ulleco kaj neceso de lingvo internacia; taŭgaj kondiĉoj de Esperanto.

Polujo.

Jaslo. Ĉi tie esperantistaro denove revigligas. Okaze de alveno de itala s-ano Mirza Marchesi (Padova) oni aranĝis ekskurson al Czarna.

Lwow. Laborista Esperanto-Societo en Lwow komencas la duan de septembro novan kurson por komencantoj.

Rumanujo.

Braşov (Transilvanio). Estas fondita Grupo „Zamenhof“, kunvenanta ĉiun ĵaŭdon vespere en la kafejo „Transilvania“.

Craiova. Nova kurso por 14 personoj, gvidata de s-ano Johano Kiss. La 10-an de aŭg. fondiĝis grupo.

Sendu tuj vian materialon por la septembra numero de „Internacia Komerc“

Poŝtmarkoj de la Germana Respubliko (neuzitaj).

Table with 2 columns: Denomination and Value. Includes Grandformato, Provizorajoj, Definitiva eldono, Dienst (Servo), and Diens (Servo) with various values and rates.

Table with 2 columns: Denomination and Value. Includes 1 serio (80 ekz.), 10 serio (800 ekz.), 100 serio (8000 ekz.), Aerpoŝto 1919 ĝis 1925, 1 serio (19 ekz.), 10 serio (190 ekz.), 100 serio (1900 ekz.).

Sendkostoj aparte. Antaŭpago per rekomendita letero. Eksterlandaj bankletoj estas kalkulataj laŭ taga kurzo.

Briefmarkenhandlung Schultze, Postfach, K ö s l i n :: Germanujo.



21-27 SEPT. Foiro de Frankfurt INFORMOJN: MESSAMT (ESPERANTO-FAKO) FRANKFURT A. MAIN

Kolektantoj atentu!

Se vi deziras kolekti poŝtmarkojn kun renomita kolektantoj, ricevi ilustritajn kartoĉojn el la tuta mondo korespondantaj rilatojn kun Brita Okcidenta Hindujo, Centra kaj Suda Ameriko aliĝu al

„Internacia Ligo“ Internacia Klubo por korespondantoj kaj ĉiuspeca kolektado.

J. L. havas membrojn en Anglujo, Argentino, Aŭstrio, Barbadoso, Bavario, Belgio, Brazilo, Bulgario, Ĉilio, Ĉinio, Cipro, Cehoslovakio, Ĉio, Danzig, Ekvadoro, Egiptujo, Estonio, Filipinaj Insuloj, Francujo, Germanujo, Grekujo, Grenado, Gvatemalo, Brita Gvatanjo, Haitio, Hindujo, Hungario, Ĥinujo, Hispanujo, Indio-Finujo, Irako, Irlando, Islando, Italujo, Japanko, Japanujo, Jindistato, Kanado, Kanal-Zono, Kolombio, Kongo, Kostariko, Kubo, Kurasao, Madagaskaro, Malta insulo, Maleajloj, Marokujo, Meksiko, Mozambiko, Nederlando, Nigerio, Nova Brunsvigo, Nova Sudkimrujo, Novlando, Nova Skotlando, Ora Bordo, Panamo, Palestino, Paragvajo, Perujo, Peruo, Polujo, Portoriko, Portugalujo, Rodozio, Rumanujo, Salvadoro, S. Marino, S. Lucio, Saravajo, Sardinio, Seĉeloj, Sirmyna, Siberio, Sir. Setlemanto, Svislando.

Kotizo: Ameriko, Afriko, Azio, Aŭstralio 1.25 dolaroj, Grand Britujo, Irlando kaj kolonioj 5/3, Eŭropa kontinento egalvaloro de 6 sv. frk.

Propra organo diverslingva kaj en Esperanto „Monda Poŝto“ depost 19 jaroj.

Skribu tuj al samideano R. S. Carter, Vicprez. de „I. L.“ Balboa Heights, Kanal-Zono, P.O.B. 52.

Nederlandaj Esperantistoj!

Ne forgesu vian devon aboni la Nederlandan Esperanto-gazeton

Holanda Esperantisto.

Ĝi enhavas: Literaturon, Ekzercubrilojn por komencantoj kaj progresintoj, Demandaron kaj ĉiujn ajn aktualaĵojn

Petu specimen de la Administracio: (Esterlanden ni sendas nur post ricevo de 1 respondkupon.)

Hazekamp 20 Zutphen.

Anoncoj.

Anoncoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto, okazintaĵoj gravaj esp. kunvenoj, festoj k.s.) senpage. Aliaj anoncoj, nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj 2 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago.

Edziĝo. D-o Ladislao Locsey en Cluj (Rumanio, Transilvanio), la 16-an de aŭgusto edziĝis kun f-lino Gizella Vavra. (Ni gratulas, Red.)

ORGENISTOJ. Mi petas poŝtkarlon kun bildo de via orgeno, volonte kun priskribo. Mi resendos senproprate liun, kiun mi ludas. C. M. Visser, orgenisto, Klundert (N. Br.), Nederlando.

VINOJN GERMANAJN KAJ EKSTERLANDAJN vendas L. Weinschenk, Zollhafen, Mainz, Germanlando. Oni postulu ofertojn. Reprezentantoj estas serĉataj.

FOTOGRAFIAĴOJ DE ESPERANTA-KARAVANO, kiu veturis trans Praha 5. 8. al XVI-a Universala Kongreso en Wien estas riceveblaj por kr. 2.— (kr. 0.50 en poŝtmarkoj) eĉ K J Helebrant, Skolska 8, Praha II., Cehoslovakio.

Korespondanto kaj Interŝanĝo.

Leteresperanto aranĝas la duan de oktobro Laborista Esperanto-Societo en Lwow (Polujo). Adreso de sekretario: Rudolf Dvorak, Lwow-Zamarstynow, Ogrodnicka 685, Polujo.

Rechtsrat Hubert Weinberger (Jura konsilisto) Dr. Geigerstrasse, Rosenheim i. Bay. (Germanlando) deziras korespondadon por il. poŝtkarto (markoj bildflankoj) kaj interŝanĝon de poŝtmarkoj kun la tuta mondo. Respondeas tuj kaj nepre. (Rekomendita de la redakcio).

S-o Hans Löbel, Turnerstr. 25, Glauchau (Sa.), Germanujo, deziras korespondi por il. PK kaj L (ŝanĝi) post interkonsento musikaĵojn, iel sukcesintaj.

Societo anonima Canninga & de Koster, Acciastrat 176, s' Gravenhage, Nederlando deziras korespondi kun la tuta mondo kaj ŝanĝas PM, PK il, gazetojn, sport-jurnalojn, fotojn ktp.

S-o Antonio Balaz, Telegrafa Centro, Sta. Clara, Kubo, Antiloj, deziras interŝanĝi il. PK kaj L kun gesamideanoj de Svislando, Grekujo, Turkujo, Danujo, Portugalujo, Svedujo kaj eksteruloj. Mi ĉiam respondos.

S-o Voldemar Birk, Tallinn, Wambola 5-3, Estonio, deziras korespondi por il. PK bfl. kaj L nur kun orientlandanoj. PM ne kolektas.

S-o Voldemar Kivimägi, Katuspaki tään 10-5, Tallinn, Estonio, deziras korespondi por il. PK kun ĉiuj landoj.

100 diversej germanaj PM 3 sv. frk. aŭ samvaloro. Afranko ekstra. Adreso: Reinh. Piffczyk, Gladbeck i. W., Höhenstr. 10, Germanujo.

S-o Fritiof Ahnfeldt, instruisto, del. IIEA, Torsfors, Svedujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi il. PK (bfl.), il. gazetojn, esperantajn kaj aliajn objektojn por instruado. Kolektas ankaŭ PM, sed paraj kaj nedifektaj.

Po 200-500 poŝtmarkoj de via lando mi sendas 200-500 PM de Germanujo. Mi respondos ĉiuj akurate. Adreso: S-o Erich Mums, Oelsnit i. Vogld. (Saksujo), Germanujo, Körnerstr. 11.

S-o Karl Haaf, Relaisstr. 55-57, Mannheim-Rheintalhofen, Germanujo, deziras korespondadon kun fraŭlinoj, de la tuta mondo por il. PK.

S-o Peter Braun, Düsseldorfstr. 89, Mannheim, Germanujo, deziras korespondadon kun fraŭlinoj de la tuta mondo por il. PK.

S-o Rudolf Klein, Frizisto, Relaisstr. 55-57, Mannheim, Germanujo, deziras korespondadon kun fraŭlinoj de la tuta mondo por il. PK.

Perfekta bakisto 22 jara (maĵstrofilio) serĉas okupadon en ta en-aŭ eksterlandaj kaj deziras korespondi por il. PK kaj L kun la tutmonda kolegaro. Certa respondado. Antonio Bauer, Schwaig No. 48 bei Erding, Oberbayern, Germanujo.

S-o Grünberg David el Taghina, Besarabio, kiun s-o Lack ensipigis en Galac, sciigu tuj sian adreson al s-o Porcsin J. V. S. „Balaton“, Atlantic Ltd, 101 Leadenhall st., London E. C. 3., Britlando.

ET numeroj: 59 ĝis 200 kun 54 mankoj vendeblaj kontraŭ ilustritaj geografiaj landopriskriboj en franca, itala, germana, anglaj lingvoj. Skribu al J. Orzech, giman. direktoro, Tarnow, Polujo.

Ĉiu ebrio post 5 minutoj malaperas. Kostas 4 orpenigoj plene sendanĝera. Samideano ne trompas! Provendajfo antaŭpago 2 ormarkoj aŭ egalvaloro. Konrad Kreuper, Regensburg (Bayern), Kramgasse 1/II, Germanujo.

Filatelistoj atentu! Kion mi povus ricevi interŝanĝe por Briefmarkenkatalog v. Michel 1924 el bona stato? Olerojn sendu per il. PK al Prof. Miecz. Sygnarski Bydgoszcz, Kordeckiego 19, Polujo.

S-o Heinz Jung, Horrem/Köln, Germ., deziras korespondi kun Esperantistoj por il. PK kaj laŭpate ankaŭ letere.

Mondvojaĝon faros per biciklo, seriozajn kunulojn mi serĉas, kiuj parolas pli da lingvoj. Skribu al: Danielo Moskovij, K. K. Felegyhara, Hungarujo.

S-o Piero Giolla, P. Seveso 50, Milano, Italujo, deziras interŝanĝi ĉion-ajn kun ruslingvaj gesamideanoj. (Leteroj havu ĉiam Esperanto-tekston nur flanke de rusa teksto, sur apartaj folioj).